Heinrich Heine,

[Sonĝante vidis mi vireton]

tradukita de Manfred Retzlaff

[El "Junaĝaj suferoj - sonĝo-bildoj", IV)

Sonĝante vidis mi vireton, kiu
En puraj vestoj marŝis sur ŝose',
Parade,sed interne estis tre
Maldelikata kaj malpura tiu.

Interne estis ĝi maltaŭga tute,
Ekstere tamen plena de dignec',
Parolis kun aplomb' kaj kuraĝeĉ',
Kun afekci', tre spite kaj akute.

Bildaron montris al mi tiu ul',
Altaron vidis mi en sorĉ-spegul',
Kaj mi ekkonis, kiu staris tie.

Jen mian karulinon vidis mi,
Jes-vorton donis al la ulo ĉi,
Kaj "amen" vokis mil diabloj fie.

Traduko de la Germana poemo "[Im Traum sah ich ein Männchen]" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

MR-126-1 / Arg-691-1394 (2012-12-03 18:27:32)